

Esperanto en Svislando, 5-a parto
Unua kunveno de SES en Rolle (27 septembro 1903)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 442 1972.03.29 & 04.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- Fakte Svisa Esperanto-Societo, kiu estis fondita dum la jaro 1902, estas la plej maljuna nacia esperanto-societo, se oni esceptas la *Société pour la propagation de l'espéranto en France* [Societo por la Disvastigo de Esperanto en Francujo], kiu estis fondita en 1898, kaj kiu antaŭ ĉio havis propagandan celon.

Cl.- La unua kunveno de Svisa Esperanto-Societo okazis la 27-an de septembro 1903 en Rolle, urbeto situanta inter Ĝenevo kaj Lausanne, ĉe la bordo de la Lemana aŭ Ĝeneva Lago.

A.- En *Svisa Espero* N° 5, oktobro 1903, aperis interesa raporto pri tiu unua kunveno de la svisaj esperantistoj. Laŭ ĝi jen kelkaj informoj pri tiu renkontiĝo :

Cl.- Jam kelkajn tagojn antaŭ tiu renkontiĝo, sinjoro Graf, librovendisto, muntis ekspozicion pri esperanto en sia montro-fenestro. La dimanĉon 27-an de septembro 1903 tiu ekspozicio estis translokigita al Hotelo de l'Kapo Nigra, en la franca *Tête Noire*, kie disvolviĝis la kunveno. La esperantistoj alvenis dum la mateno. Belega estis la vetero. Ni citas :

A.- « *Belega estis la vetero ; kelkaj kampaj benkoj stariĝis baldaŭ rapide sub la platanoj apud la bordo de l' lago ; oni sidiĝis ; la rigardoj direktiĝis al la supraĵo brilanta de l' akvo ; ŝipoj glitis en la malproksimo. »*

Cl.- La kunsido komenciĝis kun raportoj, kiuj rakontis la unuajn paŝojn de la juna societo kaj de ties provizora komitato. La raporto de la kasisto estis tre simpla. Ni citas :

A.- « *La societo kredas sin feliĉa posedi 5 frankojn kaj nenian ŝuldon. »*

Cl.- Poste regularo estis proponita kaj akceptita. Tiel la societo estis definitive fondita sub la nomo Svisa Esperanta Societo. La provizora komitato estis unuanime elektita kiel statuta komitato. La prezidanto E. Faillettaz loĝis en Lausanne, la vicprezidantoj A. Hug kaj Jean Borel en Fribourg kaj Vaumarcus apud Neuchâtel. La sekretario kaj redaktoro Th. Renard en Genève kaj la kasisto J. Feierabend en Bern. Li sola reprezentis la germanlingvanojn, ĉar tiam esperanto estis ĉefe disvastiĝinta en la franclingva Svislando. Kaj jen citaĵo koncerne la festan parton de tiu kunveno :

A.- « *La tagmanĝo kunigis kvardekon da personoj kiuj sur ĉiu telero trovas beletan karton, je l' memoro de l' kunveno : « La kastelo de Rolle, kun supre la esperanta stelo. » La manĝado estas tre gaja, kaj dum la deserto la prezidanto agrable dankas la ĉeestantojn ; ĉi tiu kunveno antaŭanonce al li sukcesojn por la estonto de nia societo. »*

Cl.- Leteroj kaj telegramoj estas legataj. Inter ili vorto de Doktoro Zamenhof. Ni citas :

A.- « *La kora telegramo de D-ro Zamenhof ekscitas varman entuziasmon ; oni redaktas tuj respondon kiu prezentas al li bondezirojn de l' Svisa Esperantistaro. »*

Cl.- Ĉeestas la kunvenon kiel observanto sinjoro Thiébaud, ŝtatkonsilanto en Ĝenevo (tio estas membro de la ĝeneva registaro). Li esprimas la deziron, ke foje esperanto estu instruata al la metilernantoj, kiuj ne havas longajn studjarojn por lerni fremdajn naciajn lingvojn. Ni devas konstati, ke tiu deziro de ministro restis nuraj vortoj, kiuj neniam efektiviĝis. Ofte estas tiel. Paroli estas pli simple, ol agi. Post la paroladoj sekvis kultura aranĝo. Ni citas la raporton :

A.- « *La bela poezio « Al la Fratoj » recitata kun sento, de S-ro Bippert kaj kelkaj ĥoroj, « l'Espero », « la Vespero », « la Kanto al Flago de l' Paco » kantataj de blindulino de Asile Recordon*

Cl.- Tio estas blindulejo

A.- *tranĉas agrable la serion de l' paroladoj. Ili estas por ĉiuj palpebla pruvo ke la lingvo tiel multe harmonia taŭgas mirinde por la poezio kaj la kanto. »*

Cl.- Profesoro Théophile Cart, kiu fakte estis sviso, venis el Parizo por ĉeesti tiun unuan svisan esperanto-kunvenon. Li prononcis optimismajn vortojn. Ni citas :

A.- « *S-ro Cart, unu el niaj plej fervoraj batalantoj, parolas vice esperante kaj france : la antaŭan jaron ni estis kelkaj en Svisujo, nun ni estas pli ol cento, la venontan jaron ni estos pli ol mil ; sed por tio, oni devas spirite kaj finance helpi tiujn kiuj batalas kuraĝe. Li admonegas konservi la unuecon de Esperanto ; ĝia triumfo nur tiamaniere povas veni. Nur akademio internacia havus la rajton ŝanĝi, se bezone, la helpan lingvon ; ĝis tiam ni ne tuŝu la verkon de D-ro Zamenhof. Varmaj aplaŭdoj montras al S-ro Cart la eĥon kiun liaj paroloj trovas en niaj koroj. »*

Cl.- La temo de la parolado de Théophile Cart pravas, ke unuflanke oni antaŭvidis multe pli rapidan disvastiĝon de esperanto, ol tio efektive estis ebla. Samtempe oni timis la prilingvajn diskutojn de la reformemuloj. Tiu timo montriĝis prava. Post kvar jaroj naskiĝos la skismo Ido. La paroladon de Théophile Cart sekvas tosto kaj rakonto de Jean Borel. La pasintan semajnon ni legis al vi erojn el la vojaĝaj spertoj de tiu esperantisto, kiu vizitis doktoron Zamenhof en Varsovio kaj konstatis, ke esperanto estas la internacia lingvo, kiun la filozofo Leibniz tiel longe serĉis. Tiu prelego kaj aliaj vortoj de la juna Edmond Privat, sekretario de l' « Junaj Esperantistoj de Genève » vekis grandegan entuziasmon. Kaj la festo poste finiĝis en familia etoso. Ni citas :

A.- « *Tiam oni revenas en la ĝardenon por babilo en la freŝa ombraĵo ; junaj blindulinoj gaje kantas, [...] estas preskaŭ familia festo kiu finiĝas. »*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!